

# FORSTISTA INFORMILO

de INTERNACIA FORSTISTA RONDO ESPERANTLINGVA

Nr. 12 Eberswalde 1985-11-18

---

Kelkaj informoj pri la vortara laboro

En la FI 9/1985 ni deklaris la intencon ĝis la fino de tiu ĉi jaro atingi la numeron 600 malfacilaĵoj malebligis atingi tiun ĉi celon. Ni povas elsendi nur la slipojn ĝis la numero 500. Anstataŭ la daŭrigo ĝis 600 ni pretigis la duan eldonon de la unuaj cent numeroj. Por tiu ĉi nocioj ĝis nun la difinoj mankas. Tial la unua prilaborad-ciklo ne povas tute kontentigi. Surbaze de tiamaj spertoj ni ja decidis, komenci la prilaboron de ĉiu nocio per la farado de E-lingva difino. La laboro pri la dua eldono, do la kreado de la 1a versio – escepte por 0001kaj 0002 – ree naskas novajn ekkonojn, kiujn ni parte konsideris jam dum la plua prilaborado de la unua eldono/versio.

- En la kapo de slipoj kelkfoje estos cititaj kromaj numeroj. Ili estos la numeroj el la "Terminology of Forest Science, Technology Practice and Products, English language Version" 1971/TS/. Tiujn kunlaborantojn, kiuj disponas pri tiu terminaro aprobita de la FAO/IUFRO Committee 6.03, ni petas komuniki la rezulton de ilia kontrolo.

- En la 1an version ni enmetis proponojn de la kunlaborantoj. Sed tiujn nacilingvaj ekvivalentojn, kiujn rifuzis nur unu kunlaboranto, ni ankoraŭ lasis tiaj kiaj ili estis. Ekzistas kaso, ke kunlaboranto forstrekis ekvivalenton, kiun alia kunlaboranto substrekis. Tial ni devas peti, ke ĉiu kunlaboranto akordigu siajn proponojn kun almenaŭ unu alia fakulo. Ni petas indiki la nomojn de tiuj ĉi kolegoj. Tiamaniere nia laboro atingos kromajn fidindan internacian aprobon.

- Kiel jam estis anoncote en la FI 9, ni sendos al ĉiu kunlaboranto nur unu slipon po numero por ŝpari paperon kaj sendkostojn. Kompreneble kunlaborantoj, kiuj bezonas kelkajn ekzemplerojn (ekz. por disvastigi al kromaj kunlaborantoj), povas ricevi pli ol unu. Ni petas la kunlaborantojn, sendi al Eberswalde listojn (laŭeble trioble, po unu por ĉiu komisiono), kiuj enhavu:

La numeron, la E-lingvan proponon, la ekvivalentojn en la prilaborataj de vi nacilingvoj. Do la listoj, kiujn ni atendas enhavu nur viajn proponojn ŝanĝitajn aŭ aldonitajn. Tiel vi ŝparas skriblaboron. Nacilingvaj ekvivalentoj sur la slipoj, kiujn vi lasas en iuj ŝanĝproponoj, estas rigardataj kiel aprobitaj.

- Ek de nun ni atentu, ke ĉe nocio, kiu konsistas el kelkaj vortoj, la ĉefa determina vorto estu metata en la unuan lokon. La normalmaniere antaŭe staranta(j)n vorto(j)n malantaŭenloku ĉirkaŭita(j)n per komoj. Pliposte la alfabeto ordigo estos farata laŭ la unua/ĉefa vorto.

- Kelkfoje ekzistas vortoj – speciale hungaraj -, kiuj komenciĝas aŭ finiĝas per ligstreko. La signifo aperas neklara. Kontrolu, ĉu oni povas anstataŭi la ligstrekojn per ripet-signo aŭ kompletigi per aliaj indikoj.

- Bonvolu kompletigi mankantajn indikojn pri la gramatika sekso. Ankaŭ kontrolu indikojn kiel ĉe verboj (tr., ntr.).

- Ni opinias, ke ni enmetu por la rusa lingvo la perfektan kaj neperfektan aspekton de verboj. Kion diras la ruse parolantaj kolegoj?

- Kontrolu la slipojn, ĉu ni necesas la indikitajn krampojn en la tiamaniera amplekso.

- Por ŝpari pressignojn uzu la eblecon de la ripetsignon, sed atentu, ke le unusignifo estu konservita.

- Ni atentigas, ke kelkfoje estis indikitaj du numeroj por la sama nocio (ekz. 0040 kaj 0062 por markoto). En tiuj ĉi kazoj ni kunigis la enhavojn de la slipoj. La liberigitan numeron ni uzas por nova nocio. Aliflanke ni disigis la enhavon de slipo, ĉar ĝi entenis diversajn nociojn (ekz. 0109). Tiamanieraj procedoj povas okazi ankaŭ en la estonteco.

- La vicigon de la lingvoj sur la slipoj de la 1a versio ĝis nun ni ne povas teknikkaŭze ŝanĝi laŭ la propono en la FI 9.

Ni memorigas vin pri la propono de s-anino Kovalëva (v. FI 9) kaj petas sendi al ŝi pasportan foton.

Daŭrigo de proponoj pri E-terminoj:

0127 apudrivera arbaro inund arbaro	0168 maldensigi (arbo)kronon
0128 manipuli/ PIV#/ (faligitajn arbojn)	0169 breĉoplenigo
0129 .1 nodoriĉa	0170 semi
0130 forstumi	0171 stumpŝosintr: trunkidi ntr
0131 stakigi (PIV)	0172 elkokoniĝi
0132 ĝermi	0173 ekskludareo
0133 hoji; pioĉi /PIV/hoji/si,ul/	0174 tubero
0134 kroĉi /PIV/	0175 selekt-marki ? mark-selekti
0135 trahaki padon	0176 helpkablo
0136 ŝarĝadotransversa	0177 (ter)bulo; radiĵo
0138 liverordono(lignon)imposto	0178 bularbido; radikaĵarbido, gleb/ ~
0139 krudhumo	0179 bulplantado; radikaĵplantado
0140 maldensigi	0180 glebplantado, /glebo/=/ terbulo
0141 maldensiga faligado	0181 ŝirmarbaro
0142 mezuri (krudlignon)	0182 nudfrosto
0144 registri	0183 trunkbarbo
0145 inventari	0184 bastfibro
0146 purigi (areon; vojon)	0185 konstruligno
0147 krevi ntr (ligno)	0186 faldirekti arbon
0148 rejuniĝaĵo el pezaj semoj	0187 arbo, dominanta
0149 ekspluatebligi (arbaron)	0188 arbo, subpremita
0150 kreski dense	0189 arbo,predominata
0151 oldkultivaĵo	0190 arbfaligado
0152 (trunk)konvekseco	0191 formkoeficiento
0153 koeficiento de la (trunk)- konvekseco	0192 arbolimo
0154 /PIV/ mankoloko / PIV/	0193 arbaspekto
0155 elflugado de semoj	0194 rezino
0156 manipuli = aŭsformen	0195 arbaltometró
0157 manipuleju	0197 ŝelrando
0158 malriĉiĝi	0198 dendtrumetrio
0159.1 eloviĝi	0199 arbformado
0160 sortimenttabelo	
0161 elhaki	
0162 elhakado de la plej valoraj arboj	
0163 elhakado (de malvaloraj arboj)	
0154 semekstraktado, klengado /ul/	
0155 stolono /PIV/	
0166 arbarero, elita	
0167 arbo, selekta	

K.-H. Simon